



Conselho Brasileiro de Esperanto

BRÁSÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal 31 - Ap. 73

Telefone 4-8033

11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07-1055

Telefone 42-9090

70.000 - Brasília (DF)

Nº 9 - OUTUBRO DE 1975 - BOLETIM INFORMATIVO

Redação: - Maria Almada

O ESPERANTO NO BRASIL

Ensaio histórico compilado por Nelson Pereira de Souza.

Ninguém tem dúvida de que o movimento esperantista brasileiro tem sua história, e, mais ainda, que essa história precisa ser contada; de um lado, como homenagem a todos aqueles que aqui batalharam pela nossa Causa; de outra parte, para servir de estímulo àqueles que ainda estão lutando, bem assim aos que estão agora aprendendo o querido idioma auxiliar internacional.

É o que pretendo neste modesto trabalho. Porém, como não posso fazê-lo sozinho, pedirei a ajuda de outros coidealistas mais

capacitados, não somente do passado, mas também dos esperantistas que estão "vivendo" essa história. Assim, receberei com a maior alegria, e desde já agradeço, quaisquer dados disponíveis sobre a história do Esperanto em geral e particularmente em cada cidade ou estado no nosso País.

Não me parece possível traçar, no momento, um plano definitivo para este trabalho, que muito dependerá de novas pesquisas e da resposta dos "samedeanos" ao apelo aqui feito. Todavia, em vista do que já existe de emigrantes esperantistas do passado e pelo que eu mesmo já tenho vivido em "Esperantujo" desde 1940, acredito que, em linhas ge

rais, possamos dividir nossa história em quatro partes, a saber: I-PRIMEIROS TEMPOS (até 1906), para o que dispomos do excelente prefácio escrito por A. Caetano Coutinho para o livro "Esperanto-Modeld", de Ismael Gomes Braga; II-EUFORIA (até 1936) que tem como subsídio principal a obra "Veterano?", do mesmo I.G.Braga; IV-TEMPOS ATUAIS.

Quem nos dirá que não poderemos, mais tarde, fixar em 1976 (uma vez que esse final 6 parece uma constante) o fim de um período? Aí terá começo... a ERA V (o simbólico número 5 da nossa estrêla) a IDA DE DE OURO, em que o movimento esperantista brasileiro, trabalhando com perfeito sentido de harmonia e organização, alcançará o elevado objetivo de todos os nossos esforços, qual seja a mais ampla divulgação do esperanto em nossa terra, seu ensino nas escolas de todos os níveis, a implantação da "idéia interna" nos corações brasileiros, já tão afeitos aos mais altos sentimentos de fraternização dos homens, e a participação mais ativa e efetiva do esperantismo brasileiro no concerto universal, principalmente com a realização aqui, pela primeira vez, do Congresso Anual da Associação Universal de Esperan-

to.

(continua)

-- o --

EL LA GAZETOJ

Uberlândia (MG)- Nia vicprezidanto D-ro Carlos de Almeida Wutke afable sendis al ni la libron "Homeopatio kaj Spiritismo" de li tradukita esperanten el la portugala. La aŭtoro estas Lauro S. Thiago. Ni kore dankas.
São Bernardo do Campo - SP

Ni ricevis "Correio Fraternal do ABC", bonegan informilon, kiun ni dankas.

Brasília (DF)- Ni ricevas akurate la gazeton "O Nosso". Dankon.

Belo Horizonte (MG)- Ankau akurate ni ricevas EE.

Ni kore dankas al samideano Alan Kardek A. Costa la ĝentilajn vortojn rilatajn al nia laboro por BKE, kaj samtempe ni laŭdas lian laboron sencêsan, sammaniere batalanta por pli bona, pli frata mondo.

Monte Aprazível (SP)-Profro Benedicto Silva ĝentile sendis al nia redakcio eltiraĵon el la libro "A Margem da História", kiun li tradukis al Esperanto. Gratulon!

Goiania (GO)- De nia samideano Domervil J. Teixeira ni ricevis propagandilon pri la urbo Goiânia kaj kalendareton por la jaro 1976-a. Kolorigita

la prospekto estas tre alloga.

Caçapava (SP)- Daŭre ni ricevas gazetojn, senditajn de nia vicprezidanto Majoro G. Silva Velho, aperigante artikotojn, kiujn li verkas por tiuj gazetoj.

Indaiatuba (SP)- Nia vicprezidanto Prof-ro Wanderley Peres informas nin, ke "Tribuna de Indaiá" ĉiu semajne publikas artikolojn pri Esperanto. La urbestro planas nomi "Esperanto" iun straton de Indaiatuba. Grava laboro de nia kunlaboranto. Gratulon!

Volta Redonda (RJ)- Samideano Denir Lopes sciigas nin, ke estas organizata kurso por malliberuloj pere de korespondado. Temas pri laŭdinda klopodo de la organizaĵo "Circulo dos missivistas amigos".

Valença (RJ)- Ni ricevis la gazeton "Em busca da luz", kiun ni tralegis kun granda plezuro. Ĝi fakte estas leginda informilo, kiu certe al ĉiuj plaĉos. Temas pri organo dumonata de la Junulara Departemento de Centro Spiritista de Valença. Sur ĝia paĝo 3-a estas tre laŭdinda artikolo de nia vicprezidanto D-ro Alberto Flores, el Volta Redonda, pri traktanta la plej gravajn partojn de Esperanto sub la titolo "Qualidades do Esperanto".

São Paulo (SP)- La gazeto

"Diário Popular" publikas bonan artikolon skribitan de nia viaprezidantino Elvira Fontes, informante pri la agado de "Bona Espero" kaj pri la sukceso de la UK de Kopenhago. Al San-Paŭlo Esperanto - Asocio alvenis el Eŭropa nova stoko da libroj inter kiuj troviĝas rekomendindaj legaĵoj. Adreso: Postkesto 5.888-CEP-01000 - São Paulo.

---xxx---

Nia vicprezidanto Gilberto F. Bartholomeu organizis ekskurson al Itukio - un partoprenis 40 gejunuloj. Li en la 12-a de la pasinta monato aŭgusto faris grandskalan propagandon ĉe TV-Gazeta Kanalo 11, prezentante originalan literaturon kaj tradukaĵojn en Esperanto. Ateŝtas lian sukceson la amaso da novaj gekursanoj (pli ol 80!) kiu aperis al kurso de San-Paulo E. Asocio. Kore ni gratulas. Porto Alegre (RS)- Nia vicprezidanto Ernani D. Corrêa, informas nin, ke li sukcesis malaltigi la prezojn de la flagoj de liaj fabrikitaĵoj; ili estas el plastika materialo, laveblaj, longdaŭraj, tre taŭgaj por ornamo salonon kaj ekspozicion. Nun ili estas akireblaj je Cr2,00. Ilia mezuro: 7cmX12cm. Adreso: Postkesto 1597-P. Alegre (RS)- CEP-90.000.

Brazilja (DF)- Carlos A. Siqueira da Cunha

Kutime en esperanta movado niaj gesamideanoj la boras anonime. Ili ne nur laboras, sed elspezas monon kaj tempon.

Bona ekzemplo estas nia kunlaboranto, respondeca pri la kaso de BKE: samideano Carlos Cunha.

Li naskiĝis en la urbo São-Vicente (SP) kaj estas sekretario de Centro Esperantista de Santos (nun forpermesita, pro lia laboro en Brazilja). Multaj memoras ankoraŭ pri lia brila oratoreco okaze de nia III Renkontiĝo Regiona en la jaro 1963-a, kiam oni lin varme aplaudis.

Samideano Cunha, kiam invitita de nia prezidanto por la posteno (kasisto) de nia Konsilantaro ne hezitis akcepti. Li komencis la malfacilan taskon havigante saldon "nulo", sed solvis ĉiujn problemojn por nia BKE kontentige.

Kiel alta funkciulo de "Banco Central do Brasil" li estas tre okupata. Malgraŭ tio, li batalas por ni.

Li eklernis Esperanton en kurso gvidita de nia prezidanto F.S. Almada, en Santos.

Lia perfekta esperanta prononco kaj bona regado de la lingvo atestas pri lia kompetenteco, kio tre helpas la progresigon de nia BKE. La emblemo de BKE

estas desegnaĵo de lia filo Carlos Cunha Jr., kaj li mem estas sendube unu el la fortaj kolonoj sur kiuj sin apogas BKE.

Bauru (SP)- Kun granda plezuro ni ricevis informilon pri la Societo Bauru de Esperanto, kiu disponigas la okazintaĵojn de la Societo travivitajn dum la jaro finiĝinta en aŭgusto pasinta, t.e. de l.V.74 ĝis 30.IV.1975. Ĝi okazigis kursojn en la kolegio "Guedes de Azevedo", en lernejo "Progresso" kaj en la "Legião da Boa Vontade". Ĝi disvendis librojn ricevitaĵojn de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj-Rio.

Elstaraj esperantistoj el San-Paulo, Rio de Janeiro, Promissão, vizitis la Societon. Oni okazigis ekspozicion, omaĝis la Majstron Zamenhof en la lernejo "Progresso", kie paroladis ĝia prezidanto Euclydes Geraldis de Carvalho, Antonio João Fraga Padilha kaj Celina Lourdes Alves Neves, pri la vivo de Zamenhof.

Oni sciigas ankaŭ, ke la nombro de la anoj de la Societo kreskas.

Jen gratulinda laboro!

----- xx -----

NOVA VICPREZIDANTO

Invitita de nia prezidanto, akceptis partopreni la kadron de nia vicprezidentaro Prof-ro D-ro Benedicto Silva, por la fako TRADUKADO, kion ni kore dankas.

Vizitis nian prezidanton
ton samideano Cláudio Zimmermann, granda amiko de Esperanto kaj sindona batalanto. Li afable kontribuis donacante \$200,00 por la kaso de nia BKE.

----- xx -----

GRAVA OMAÇO

La Komunuma Ĉambro de la urbo S. Carlos (SP) omaĝis per leĝo aprobita sub nº 7496, la Lingvon Internacian Esperanto, konsiderante "Dia da Lingua Internacional Esperanto", la tagon 15-an de decembro, kiam ĉiujare oni devas memori la naskiĝtagon de la lingvisto pola Lazaro Ludoviko Zamenhof, kreinto de tiu lingvo.

André Luiz de Souza

Kvankam juna, André Luiz de Souza, filo de D-ro Fausto de Souza, jam estas serioza artisto. Unu el la plej brilaj okazintaĵoj de la X Seminario de Esperanto, kiun organizis ĉijare la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, senduble estis la bonega pianludado de tiu talenta junulo.

Nia juna samideano bone regas la internacian idiomon kaj ne hezitas briligi niajn renkontiĝojn per siaj recitaloj. La muziko de Bach, Bethoven, Chopin kaj Vila Lobos prezentitaj de li sammaniere impresis la aŭskultantaron. La silento en la salono estis plena

kaj la muziko de André Luiz kondukis la ĉeestantojn en la misteran mondon de la famaj komponistoj, kaj li ŝajnis genia kaj magia interpretisto, kiun la tuta mondo ankoraŭ admiras. Senlima estas la ebleco de ĉiu esperantisto por aperi en la mondo. Ni esperas ĝui la grandiozan pianludadon de André Luiz en Brazilo dum la 11-a Seminario, en la venonta jaro.

NI GRATULAS

La hejmon de niaj genevoj ing. D-ro Flavio Almeida kaj Vera goigis la naskiĝo de ilia filino Aline. Ni kore gratulas niajn gesamideanojn kaj deziras feliĉon kaj progreson al nia nova denaska esperantistino!

-----xx-----

FILIPENSES (4,6-9)

..."meus irmãos, tudo o que há de verdadeiro, de honesto, tudo o que é justo, puro, tudo o que é digno de ser amado, tudo o que é louvável, seja tudo isto o objeto dos seus pensamentos. Procurem praticar o que vocês ouviram, receberam e aprenderam de mim, e o Deus da paz estará com vocês".

-----xx-----

NIA DEVIZO: -ANTANŬEN!

"Renovigi ne estas destrui. Ĝi estas lasi netuŝitaj la fundamentojn sur

kiuj oni rebonigu la konstruaĵon por la ĝenerala bono. - El Kristana Agendo. Jen la tasko de BKE, pro kio ĝi estis fondita.

CURSO DE ESPERANTO

PRIMEIRA LIÇÃO

Continuando nossas lições, estudemos as consoantes cujos sons diferem das do alfabeto português: Cc (tsô) - Laca (lat sa); - Ĉĉ (tchô) - Ĉio (tchiô) Ĉiam (tchiám); Gg (gô) seu som é igual antes de todas as vogais: Geologio (gêôlôgúô); Gipso (guipsô); Ĝĝ (djô) - Ĝardeno (djardênô); Ĝirafo (dji-ráfô); Hh (hô aspirado) - Havi (aspirado gutural) Aĥ (mais aspirado que o primeiro), soa quase como um r gutural - Eĥo - (eĥô) Ĵĵ (soa como um j do português) - Ĵurnalo (jurnálô) Ĵeleo (gêlêô); Ss (soa como c e nunca como z entre vogais - Kaso (cáçô); Raŝo (raçô); Ŝŝ (chô) - Kliŝo (clichô); Ŝako (cháçô). Não devemos esquecer que o acento tônico das palavras recai sempre na penúltima sílaba: Skandalo (scandálo); Seminario (seminário).

SEGUNDA LIÇÃO

Conhecido o alfabeto, passemos às regras gramaticais, começando pelos nomes ou substantivos. No Esperanto os nomes têm como final o. Os nomes ou

proprias

substantivos de outras linguas são geralmente esperantizados com o acréscimo de o: London faz Londo no (Londres); Paris faz Parizo, pois que o s final soa z. Há, contudo, nomes que não podem ser esperantizados facilmente, e, neste caso ou têm tradução direta ou são conservados como no original: Johano (João), Jozefo (José), etc. O nome Mario foi usado como tradução de Maria, porém, tal forma não encontrou aceitação formal e passou a ser usada como no original latino: Maria. Acompanhando essa exceção outros nomes passaram a ter o a como final: Mariana, Sofia, Ursula, Helena, etc.

Os demais nomes, comuns, não fogem à regra: terminam invariavelmente em o: Patro (pátro), Filo (fílo), Frato (frátô). Com o sufixo IN formamos o feminino, e, como os substantivos terminam em o, os nomes femininos também têm esse final: PatrINO (mãe), FilINO (filha); FratINO (irmã); KatINO (gata) etc.

----- xx -----

EL TESALONIKO-Grekio -

Akurate ni ricevas la gazeton "Tamtamo", kiu aperigas interesajn artikolojn numeritajn. Ekz.: la nº 89 diras "Kie ne ekzistas abundo nek manko, tie elmontriĝas la plej noblaj moroj". La nº 90 di-

ras "La grandaĵojn faras tiuj, kiuj sin energie dediĉas al unu ideo". La n^o 91: "La mondo jen antaŭ - enmarŝas en kelkaj sektoroj, jen stagnas en aliaj kaj jen regresas en aliaj: Se iu en 1910 estus antaŭdirinta ke en 1953 kaj 1960 la reĝino de Nederlando vestita per akvobotoj iros al la homoj por paroli kun ili kaj kuraĝigi ilin, oni ne estus kredinta lin. Sekve tiuj, kiuj asertas ke la nuntempaj homoj malpli sin donas unu al la alia ol la antaŭaj generacioj, malpravas.

Aliflanke Johano Baptisto estis "Voĉo de krianto en la dezerto". La reĝino Isabela tamen atente aŭskultis Kristoforon Kolombon. La nunaj esperantistoj en socialistaj landoj envias lin, ĉar ili nun tute ne estas aŭdataj de la tieaj surdaj regantoj. Ili krias en la dezerto. Kaj oni tute ne kredas al ili, ke tiel okazas tie. Sekve: Tiuj, kiuj asertas ke la nuntempaj homoj pli multe sin donas unu al la alia ol la antaŭaj, ankaŭ malpravas.

-----xx-----

Grekio havas 132.562 kvadratkilometrojn, estas vasta, kun loĝantaro de proksimume ok milionoj kaj duono, kaj konsistas el

kontinenta parto, je la suda pinto de la Balkana duoninsulo, kaj el grupo da proksimume 1425 insuloj, el kiuj ĉirkaŭ ducent estas loĝataj. La plej konataj el ili estas Kreto, je la plej suda punkto de Eŭropo, Kerkira (aŭ Korfu), Lesbos, Hios, Samos, Mikonos, Delos, Rodos, Kos, Hidra, Speces, K.a.

La admirindaj Grekiaj marbordoj, dekkvinmil kilometrojn longaj, allogas ĉiujare milojn da ma-

ramaj turistoj. La klimato de Grekio estas varma, mediteranea, kun meznombre 300 sunaj tagoj jare.

Ĝi estis elektita sidejo de Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1976. Aliĝu ni al ĝi!!

NI KOREKTAS

En nia Bulteno n^o 7 okazis bedaŭrinda miskompreno. Nome, la sugesto de S-ino Hersila Valverde (Rio de Janeiro-paĝo 5-a) ne estis prezentita dum la X Seminario de Esperanto.

La Redakcio.

LA 60-A UNIVERSALA KONGRE SO DE ESPERANTO EN HARMO- NIA ETOSO

Nia vicprezidanto Giuseppe Grattapaglia, parto preninte la 60-an UK'n de Kopenhago, raportis pri la sukcesa evento:

"Post la Hamburga kongreso, pri kies travivaĵoj la membraro de UEA, loganta "periferie" de la movado ne povis esti ĝisfunde informita, oni atendis Kopenhagon kvazaŭ kiel pruvon, ĉu efektive nia asocio perdis la tradician neŭtralecon por fali en la manojn de senskrupulaj politikistoj.

Feliĉe, la homoj, kiuj ĉeestis la 60-an Universalan Kongreson, povis mem konstati, ke la atmosfero estis plene harmonia, ke la estraro de UEA ne perfidis la statuton kaj ke la t.n. "danĝero pri malintegriĝo", estis naiva blufu elpensita de kelkaj homoj, kiuj ne volis akcepti la demokratiajn ŝanĝojn okazintaj en Hamburgo!

Tiu konstato estis vere ĝoiga kaj forigis en la membroj ĉiajn dubojn pri la fidindeco en la nuntempaj gvidantoj de UEA. Pro tio, oni povas aserti, ke la kongresaj laboroj estis tre konstruaj kaj la klopodoj reanigi la financojn de la asocio, seriozaj kaj realecaj.

Kiel konate, tuj post la Kopenhaga kongreso, oka

zis en Saarlando kunveno de ia pseŭdo "Neŭtrala Esperanto-Movado". Tiu klopodo iel disrompi, per senbazaj pretekstoj, la unuecon de nia movado, mi zere fiaskis antaŭ kvardeko da partoprenantoj, el kiuj, plimulto eĉ estis nekonsciaj instrumentoj de tiu manpleno da kontraŭuloj, kiuj vane klopodas kredigi, ke en UEA okazis iaspeca politika puĉo."

----- xx -----

SINDONAJ KONTRIBUAĴOJ

Kore ni dankas al gesa mideanoj la jenajn sumojn afable senditajn:

Maria Rosa de Angelis	15,
Decio Estrela Maia	200,
Antonieta Almada	50,
Dr. Jatir G. Vieira	100,
Ernani Dias Corrêa	100,
Ass. Cearense de Espto.	50,
Baha Espto.-ligo	50,
	565,

----- xx -----

PLANO DE EDIÇÃO JUNIOR

Nosso vice-presidente, Dr. Walter A. Francini, planeja publicar seu livro "Esperanto sem Preconceitos" para cuja publicação há um plano na Associação Paulista de Esperanto-Cx. Postal 5.888 CEP-01000-São Paulo. Os interessados queiram dirigir-se àquela entidade.